



Steven Bradbury





Alisa Camplin

Aŭstraliaj gajnintoj de ora medalo en la Vintra
Olimpiko 2002

Esperanto sub la Suda Kruco

Majo-Junio 2002
Numero 57 (vol. 10, no. 3)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Numero 57 (volumo 10, numero 3), Majo-Junio 2002

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,
143 Lawson St, Redfern, NSW 2016,
Aŭstralio. E-poŝte:

libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Toowoomba Road, Oakey
Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:
hazgreen@tmba.design.net.au

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensas kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mg aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

La kovrilbildo:

La unuan fojon, Aŭstralio gajnis orajn medalojn en somera olimpiko. Steven Bradbury gajnis sian per la simpla fakto ke nur li restis surpiede por atingi la finajon de la konkursejo...

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Mia vojaĝo al Perto (Franciska Toubale)	3
AEA somerkursaro 2003	4
Komento de leganto (Istvan Ertl)	6
Malrapida merkato	6
Nova konkurso	7
Nekrologo: Fred Turvey	7
NZEA kongreso (Donald Rogers kaj Howard Gravatt)	17
La evoluo de Esperanto (Marcel Leereveld kaj Donald Broadribb)	20
Interrete	23
Kuriozaĵo el Rio	25
El la regionoj	26
Auditor's Report	27

Recenzoj:

<i>Falantaj muroj</i> de Trevor Steele	5
<i>Malvivaj animoj</i> de N. Gogol	5
<i>Konsilisto Krespel</i> de E.T.A. Hoffman	6
<i>Metropoliteno</i> de Vladimir Varankin Recenzas R.C. Gates	9

For the Beginner:

Internet and Unicode	13
Baza & Meza Ekzamenoj	13
Passive Voice and Active Voice ..	14
(by Marcel Leereveld)	

ENK estas legebla per Interreto:

<http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por artikoloj por la julia numero: 15 junio.

Mia vojaĝo al Perto

de Franciska Toubale

Kompreneble, por atingi Perton eblas flugi de Melbourne kaj alveni post du kaj duona horoj, do eĉ antaŭ la foriro, pro la trihora tempodiferenco.¹ Sed mi elektis malrapidan vojon por havi pli klaran ideon pri la distanco kaj malkovri iom pli da Aŭstralio.

Mi forlasis Melburnon dimanĉe, la 30an de decembro. Post tranoktado en la trajno OVERLAND mi atingis Adelajdon, la morgaŭon frue matene. Sur la perono atendis Ŝandor kaj Helen. Ŝandor instalas miajn valizojn sur la portilon de sia biciklo, donis al mi biciklon, kaj ek! ni pedalis al la urbo.

Memoru ke Ŝandor kaj Helen loĝas en komuna domo kun kvar aliaj homoj. Inter ili ĉiu decido estas tre demokrate diskutata. Ili penas projekti la medion per konscia uzo de naturaj vivrimedoj. Ili kreskigas legomojn kaj fruktojn. Ilia domo aspektas kampara kaj tute ne similas al tiuj de la najbaroj, kiuj estas ĉirkaŭataj de sekura barilo kaj regule tondata razeno.

Je la tagmanĝo venis por saluti min la adelajdaj esperantistoj kiuj ne povis partopreni la somerkursaron, kaj kelkaj scivolemuloj kiuj eble iam lernos la internacian lingvon.

Pro la malvarmeco ni ne atendis la noktomezon en Glenelg kie amaso da homoj aŭskultadis muzikon, dancis, rigardis pireteknikaĵon kaj deziris unu al la alia “feliĉan jaron 2002”. Ni lernis novajn ludojn en la domo.


La morgaŭon, la 1an de januaro, mi trafis la faman INDIAN PACIFIC-on kun emocio. Tiu impona trajno enhavas 31 vagonojn kaj estas 750 metrojn longa. Se vi kapablas sidi tage kaj nokte, la vojaĝo ne estas tre kosta. Tion faras ĉefe gejunuloj. En la komfortaj kuŝejoj troviĝas multe da emeritoj: ekskomerlistoj al kiuj ne mankas mono, sed ankaŭ homoj kiuj ŝparis monon dum sia tuta vivo por realigi sian revon. Ĉiu kupeo havas duŝejon, necesejon—nenio mankas escepte de spaco. Sed eblas iri al salono, por admiri la pejzaĝon, per stranga zigzaga koridoro, kie troviĝas la unulitaj kupeoj. Tiu formo fakte faciligas la marŝadon dum la trajno ruliĝadas.

La manĝoj estas gravaj momentoj dum kiuj eblas konatiĝi kaj babili kun la kunvojaĝantoj. La kelneroj agas tute konforme al la etiketo kaj alportas allogajn gastronomiajn pladojn.

Ĉiun matenon servistino ŝovas sub la pordon la tagan programon ekde la 6a matene.

Dum la trajno malproksimiĝas de Adelajdo, la tritikajn kampojn, en kiu de tempo al tempo aperas kuranta vulpo, anstataŭas arboj disaj sur ruĝa tero. Ili pli kaj pli malgrandiĝas ĝis restas nur la salarbustoj de NULLARBOR, dezerto de kalkoŝtonoj tiom granda kiom Viktorio.

Ĉar la rezervuoj de la lokomotivo bezonas repleniĝi, kaj la leteraro de kaj al la loĝantoj esti interŝanĝitaj, la trajno devas halti kaj la pasaĝeroj rajtas eltrajniĝi kaj viziti la lokon. Tiel ni malkovris COOK-on, domaro en la

1. Dum la somero, ĉar en Okcidenta Aŭstralio oni ne uzas la specialan “someran tempo-sistemon”. — 



Franciska Toubale en la dezerto Nullarbor

mezo de NULLARBOR, konstruitan pro la trajno. Ĉiuj “urboj” de la regiono havas la nomon de iu aŭstralia ĉefministro. La nomo COOK estas honore al Sir Joseph Cook¹.

Je sia apogeo, ĝi enhavis ĝis 300 loĝantojn. Kiel en ĉiu urbo, troviĝas ĉionvendejo, lernejo, naĝejo, hospitalo grava por la tuta regiono, kaj eĉ golfejo tute senherba. Sed la gloro de COOK ekvelkis kiam la registaro privatigis la fervojon meze de la 1990’oj. Restas nun nur unu familio. Ili vendas memoraĵojn kaj librojn. La fervoja kompanio procesas kontraŭ ilial, verŝajne pro konkurenco. Do ili baldaŭ foriros, kaj COOK iĝos mortinta urbo.

Male, Kalgoorlie, je la limo de NULLARBOR, daŭre presperas dank’ al sia orminejo. Tamen mi ne tre ŝatis la multanombrajn hotelojn por dolĉa ripozo de lacaj viroj; unuvorte, mi ne ŝatis la orfrenezan etoson de tiu urbo.

Post 2659 kilometroj da veturado, mi atingis Perton en la mateno de la 3a de januaro, tute preta por malkovri tiun mediteraneecan urbon, kaj en bona korpa kaj mensa stato por komenci la somerkursaron. □

1. Joseph Cook (1860-1947) estis ĉefministro de Aŭstralio en 1913-1914.

19a Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto Internacia Domo, Melburno 05/01 –17/01/03

Por la dusemajna kursaro, planoj ekfaratas kreante eĉ pli internacian etoson ol antaŭe per invitoj al du diplomitaj eksterlandaj instruistoj.

Instruado ofertatos je 5 niveloj anstataŭ la kutimaj 4 kaj partoprenantoj individue ricevos apartan helpon pri diversaj lingvoproblemetoj. Eblos prepari sin por la baza kaj meza ekzamenoj de AEA, sed restos ankaŭ sufiĉe da tempo por distrado, babilado kaj ekskursado.

Post du monatoj aperos detaligita programo kun kostoj de registriĝo kaj loĝado. Ekkomencu plani vian ĉeeston per noto en via taglibro!

Jennifer Bishop

Lingva Konsilo

Post pasivaj participoj la prepozicio “de” ĉiam montras nur la *aganton*; ekzemple, en la frazo “la libro estis legata de Adolfo” la prepozicio “de” montras, ke Adolfo estas la aganto, kiu legas. Uzi post pasiva participo simplan prepozicion “de” en ia alia senco ni devas ĉiam eviti. Ekzemple, anstataŭ la frazo: “lia propra poŝhorloĝo estis ŝtelita de la hoko, sur kiu li ordinare pendigis ĝin” estus pli bone diri “for de la hoko...” Anstataŭ “ŝi troviĝis ŝirmata for de liaj entreprenoj” mi konsilus diri “kontraŭ liaj entreprenoj”.

L.L. Zamenhof
Lingvaj respondoj.



Recenzas via Redaktoro



Trevor Steele: *Falantaj muroj*. Viena: Internacia Esperanto-Muzeo, 1997. 160p., broŝo.

Takso: 🍷🍷🍷🍷

17 artikoloj verkitaj de Trevor Steele ĉirkaŭ la tempo de la disfaliĝo de la Sovetia bloko (ĝenerale: 1989-1992) plus tri artikoloj pri liaj spertoj en Maŭrcio (1967), Hispanio (1971), Brazilo (1977), kaj Aŭstralio (1993). Kelkaj el la artikoloj jam aperis sia-tempe en esperantaj gazetoj, i.a. ankaŭ en *ENK*.

Estas interese, nun, post pli ol dek jaroj, legi pri la eventoj en Sovetunio dum ĝia disiĝa periodo: la puĉo kontraŭ Gorbaĉov, la sendependiĝo de la antaŭaj respublikoj de la Unio, kc. Trevor verkis dum li estis en Sovetunio mem, do el la interno de la okazajoj, kaj ni ricevas per tio tre alian vidon ol ni havis tiutempe en la Okcidento.

Ŝajnas al mi — kvankam eble mia memoro eraras pri tio — ke Trevor reverkis kelkajn el la artikoloj post kiam mi unue vidis ilin en manuskripta formo. Lia raporto pri la eventoj en Brazilo tre diferencas de mia memoro pri lia preparolo antaŭ jam multaj jaroj. Ĉu mi tro mismemoras pri lia tro facila kredemo al pseŭdoreligiaj pretendoj? Nu, ne gravas. Sendube li havas ankaŭajn miskoncepitojn pri mi...

Kiel ĉiam, la stilo kaj enhavo de la artikoloj donas ĝuplenan legadon. Mi bedaŭras ne povi aperigi recenzon pri la libro jam antaŭ kvar aŭ kvin jaroj, sed ial ekzemplero de la libro atingis min antaŭ nur du-tri monatoj. Valora libro ĉiurilate. □

Nikolaj Gogol: *Malvivaj animoj*. Tr. el la rusa de Vladimir Vyĉegjanin. Eld. Sezonoj, Jekaterinburg, 2001. 224 p., bind.

Takso: 🍷🍷🍷🍷

La ruslingva originalo de ĉi tiu tre distra humura romano aperis en 1842, kaj fariĝis rusa klasikaĵo. La verkinto satiras la rusan socion tiutempan ofte amuze, kelkfoje cerbumige (kvankam granda nombro da postnotoj de la tradukinto multe helpas), kaj plejofte facile kompreneble.

La intrigo: iu nekonato, Paŭlo Ivanoviĉ Ĉiĉikov, kun siaj du servistoj kaj triĉevala kaleŝo, trairas diversajn partojn de Rusio, familiariĝante en ĉiu loko kun la plej riĉaj kaj plej influaj posedantoj de servutuloj. Li proponas al ĉiu el la posedantoj tre strangan aferon: li volas aĉeti la servutulojn mortintajn post la lasta censo.

Kial do oni aĉetas mortinton? Kaj kiel? Evidente ne ties kadavron. Nek ties spiriton. Ĉiĉikov neniam eksplikas, al li gravas nur ke la posedanto subskribu validan vendokontrakton, por kio li ricevas pagon interkonsentitan kun Ĉiĉikov.

La leganto informiĝas pri la kialo de la aĉetado nur en la plejlastaj paĝoj de la romano. Mi ne volas forpreni de novaj legantoj la plezuron mem konjektante pri ĝi, kaj trovi la eksplikon de tiu mistero.

Mi konsilas al la leganto havi ĉemane bonan vortaron por serĉi eksplikojn pri diversaj (malnov)-rusaj ĉiutagaĵoj. Lingve, stile, historie, kaj enhave ĉi tiu eldono rajtas fiere stari sur via librobreto. □

E. T. A. [Ernst Theodor Amadeus] **Hoffmann:** *Konsilisto Krespel*. Tr. el la germana de Wolfgang Kirschstein. Kalingrad: Sezonoj, 2001. 24p., broŝurita.

Takso: 🍷🍷🍷

Distra, iom amuza, noveleto fantazia. “Konsilisto Krespel” estas enigma viro en malgranda vilaĝo, kiu malkonstruas altvalorajn violonojn por trovi la sekretojn de ilia konstruiĝo, kaj mem konstruas novajn bonegajn violonojn — kiujn li rifuzas vendi. Kun li loĝas mistera junulino, eksterordinare talenta kantistino, kiun li laŭeble strebas malurĝi kanti.

Kiel ekspliki tujn mirindaĵojn? La solvo estas fantaziega, kaj malebla, sed imagoplena. □

Komento de Leganto

Skribas István Ertl:

Leginte Vian ĵusan recenzon pri *Maskerado ĉirkaŭ la morto*, mi reagu nur pri marĝena, sed eventuale ja tre ĝena aspekto, nome la papera kaj binda kvalito de la volumo.

Evidente, ĉies spertoj povas malsami, sed mi atestas ke mia ekzemplero, legita kaj relegita, ĉifita kaj tordita, insiste turmentita (pro hungara traduko de la verko, kiun mi ĵus finis), malgraŭ ĉio perfekte transvivis ĉiajn peripetiojn: nenio elŝiriĝis, nenio malgluiĝis! □

Malrapida Merkato

Malrapideco estas apartaĵo de la Esperanto-merkato. Komercaj vendejoj ne tenus sur siaj bretoj samajn varojn same longe kiel Esperantaj libroservoj.

Ĉiujare UEA publikigas la furorliston de la Libroservo de UEA pri la vendoj dum la antaŭa jaro. Tiu tradicio daŭras jam de jardekoj. Dumlonge la jaraj listoj konsistis nur el titoloj en ordo de ilia populareco. Ekde 1992 aperas ankaŭ la nombroj de ekzempleroj venditaj, kio faras la listojn multe pli informenhavaj.

En la 12-jara listo la plej aĝa estas *La vivo de la plantoj*, eldonita de Stafeto en 1957. (Kaj 98 ekz. de ĝi plu atendis aĉetonton komence de oktobro 2001!) Ses estis eldonitaj en la 60-aj jaroj: la Zamenhofa *Hamleto* (1964), *Karlo* (1968), kaj la Stafeto-libroj *Zamenhof*, aŭtoro de *Esperanto* (1962),

33 rakontoj (1964), *Norda naturo* (1967) kaj *Libro de amo* (1969).

Kelkaj titoloj de Stafeto cetere troviĝas en la listo pro tio, ke en la 80-aj jaroj ili longe restis ekster la merkato, ĝis UEA en 1989 aĉetis de J. Régulo lian tutan stokon kaj povis resurmerkatiĝi ilin. Longan foreston sekvis vigla vendo-ondo.

UEA daŭre vendas ankaŭ librojn de antaŭ la dua mondmilito. Finnlando havas la duban honoron de devenlando de la plej malnovaj: ankoraŭ aĉetebblas la teatraĵo *La botistoj* (A. Kivi) kaj la romano *La batalo pri la domo Heikkila* (J. Linnankoski), ambaŭ presitaj en 1919! Kun resp. 19 kaj 24 ekzempleroj ili ne povis revii pri loko en la plej furora centoj, sed ili ankaŭ ne bezonas honti: ĉirkaŭ 300 titoloj trovis eĉ ne unu aĉetmulon dum la tuta 12-jara periodo.

[El *Eventoj*]

Nova Konkurso

Vera Payne proponis al ni la temon por nova konkurso: Ĉisube vi trovas diagramon en kiu estas naŭ literoj:

S	Ĝ	E
R	I	U
O	T	K

Kiom da vortoj vi povas fari el la literoj ĉisupre montrataj? Ĉiu vorto devas enhavi la centran literon (= la literon *i*). Vi devas fari almenaŭ unu naŭliteran vorton. Vi ne rajtas uzi unusaman literon pli ol unufoje en vorto. (Ekzemple: vi ne rajtas uzi *t* dufoje en iu vorto.) Ĉiu vorto devas esti kompleta; vi ne rajtas uzi saman radikon en pli ol unu vorto.

10 vortoj: bona laboro

15 vortoj: tre bona laboro

20 aŭ pli da vortoj: bonega laboro!

Ĉiuj partoprenantoj devos atingi la redaktoron antaŭ la 15a de junio. □

Nekrologo

Fred Turvey 1926-2002

La 25an de januaro Fred Turvey, edzo de Edna, patro de Alan kaj Ruth, kaj bopatro de Jo, forpasis en malsanulejo post kelksemajna senkonscieco. Fred estis esperantisto dum ĉ 40 jaroj kaj tre flue parolis la lingvon.

Frederick Thomas Turvey naskiĝis je la 4-a de januaro 1926 en Bankstown, Sidnejo. Li estis la dua infano el familio de 11 infanoj. Lia patro, Tom, laboris ĉe fervojo kun la tasko prizorgi la ĉevalojn. Tom estis aktiva sindikatano kaj havis fortajn ligojn

kun ERNABELLA, aborigena komunumo en centra Aŭstralio. Du fratinoj de Fred loĝis kaj laboris tie.

Malgraŭ malbona vidpovo ekde junaĝo, Fred forte klopodis plensperti la vivon kaj lia vivo estas atesto pri tio. Post la lernejo Fred sukcese studis hortikulturon ĉe Teknika Kolegio Ultimo. Li laboris ĉe la loka registraro de Bankstown kaj ĉe farmbienoj apud Patterson kaj Narromine.

En 1948 Fred kandidatiĝis kiel pastro en la Presbiteriana Eklezio. Li stu-

dis la korean lingvon kiel parto de sia kurso. En 1955 li ordiniĝis pastro kaj samtempe iĝis misiisto por Koreo. Li loĝis en Koreo dum 8 jaroj kaj helpis reestabli farmbienojn post la Korea Milito.

Post sia reveno li estis pastro en Lidcombe. Li estis esperantisto kaj en 1965 edziĝis kun Edna, alia esperantisto. Li estis fiera patro de Alan kaj Ruth kaj avo de Eric kaj Karina.

En 1969 li pastris en la centra urba komisiono de la Presbiterioj, kio poste iĝis la Suda Sidneja Protestantana Paroĥo. Tiel li havis ligojn kun lokaj komunumaj grupoj (Porkomuna Helpejo, Laborista, Aborigena, ks.) en suda Sidnejo. Pro malsano li eksiĝis el la posteno en 1971, sed malgraŭ tio li restis en la loko kaj tre aktivis en lokaj komunumaj grupoj pri pacaj, mediaj, religiaj, kaj komunumaj aferoj. Li estis membro de la Asocio por Unuiĝintaj Nacioj kaj la Asocio de Amikeco kun Rusio kaj Ĉinio. Li havis amikojn diversreligiajn, precipe katolikajn, kvakerajn, unitarianajn. Li kuris en la konkurso “de la urbo al la strando” kelkfoje, marŝis en la MARDIGRAS kaj ludis la akordionon por komunumaj grupoj.

En 1966 la loka registaro de Suda Sidnejo honoris Fredon per la aljuĝo de la Aŭstralitaga Komunuma Premio. Li daŭrigis sian porkomunuman laboron ĝis la fino.

Tomaso O’Gliasain skribas: La unuan fojon kiam mi renkontis Fred-Turvey-on, ni manifestaciis kontraŭ mortoj de nigruloj en karceroj. Poste mi trovis ke li iel rilatis al preskaŭ ĉiu progresiva movado al kiu mi mem rilatis. Li donis subtenon al nia malgranda Unitaria preĝejo kaj li ankaŭ iĝis amiko de VINEGAR HILL. Mi estos ĉiam dankema ke Fred estis mia amiko kaj konfidato. Li estis vere “patro konfesprenanto” por mi kaj por mia edzino en nia privata vivo. Li estos ĉiam parto de ni. Ĉeesto ĉe lia adiaŭiĝo kaj celebros de lia vivo, kun liaj familianoj kaj geamikoj, estas sperto kiu ĉiam estos kun ni.

Terry Manley skribas: Post reveno al Sidnejo en 1992 mi partoprenis en la Esperanto-kongreso ĉe Richmond. Tie promenante sub grandaj arboj mi renkontis Fredon. Fred donis al mi la brakon por ke mi gvidu lin kaj ni parolis dum iom da tempo. Mi tuj konstatis ke malgraŭ sia aspekto (Fred nekutime vestis sin) li estis klerulo pri multaj temoj kaj luktanto por justeco en la mondo. Malgraŭ la malriĉa aspekto Fred havis mienon kaj internan fortecon de reĝo por mi. Same kiel Tomaso trovis konfidaton, mi turnis min al Fred en tempo de interna konfuzo por konsilo kaj li multe helpis min. Dankon Fred kaj pacon al vi.

[El *Telopeo* marto kaj aprilo 2002] □

Ĉu via kompulilo uzas Mac OS X-on?

Vi scias ke vi nun povas fari la Esperantajn literojn per Unikodo. Sed kion pri programoj por verki unikode en Esperanto? Jen du *senpagaj* plenkapablaj verkoprogramoj uzeblaj, kaj elŝuteblaj ĉe www.versiontracker.com:

Okito Composer — kun kelkaj neatenditaj ekstraj kapabloj por spertuloj FarText Gold — tre stabila, kun ĉio bezona por ĉiutaga uzado. □

Pri *Metropoliteno*

diskutas Ronald Cecil Gates

Vladimir Varankin: *Metropoliteno*. [1933]. 3a eldono: Jekaterinburg: Sezonoj, 1992. 143p.

En Amsterdamo en la jaro 1933 estis eldonita *Metropoliteno*¹, unu el la dekelkaj romanoj plej frue verkitaj en Esperanto, kaj aserteble klasikaĵo.

La aŭtoro, Vladimir Varankin, ruso naskita en 1902, elstaris inter aktivuloj pri Esperanto en tiama Sovetunio.

Eklerninte la lingvon en la lasta jaro de siaj gimnaziaj studoj en Nijnij Novgorod, li fondis en tiu urbo rondeton de junaj esperantistoj. Tiel en 1920 komenciĝis dek sep jaroj da sindediĉo² al Esperanto pere de verkado, tradukado, organizado, kaj propagandado.

Li akiris postenon ĉe kavaleria lernejo kiel politika kunlaboranto kaj bibliotekisto. Transloĝiĝinte al Moskvo en 1927, li studis en universitata fakultato pri sociaj sciencoj, kaj poste iĝis direktoro de alta lernejo pri fremdaj lingvoj. Ekde 1935 li samtempe instruis historion en alia moskva instituto. Dume li multe verkis (eĉ aperigante romanon en la rusa), kaj aktivis en la tutrusia komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio, iĝante fine ĝia ĝenerala sekretario. Li iĝis ankaŭ membro de la Lingva Komitato de Akademio de Esperanto.

Tamen Esperanto ne estis imuna kontraŭ la stalina buĉado ante³ “popalmamikojn”. Ĝi estis proklamita “lingvo de cionistoj, kosmopolitoj kaj faŝistoj”, pro kio *kaj* la literaturo *kaj* la esperantistoj mem suferis kampanjon

celantan ilian neniigon. Varankin-on oni arestis en februaro 1938, kondamnis kiel aktivan membron de spiona kaj terorista organizaĵo, kaj tuj mortpafis.

Devis pasi preskaŭ du jardekoj, antaŭ ol la militista kolegio de la supera kortumo, kontrolinte lian kazon, trovis ke li estis kondamnita senbaze, nuligis la verdikton kaj restarigis lin en la Komunista Partio.

Metropoliteno longas pli ol okdek mil vortojn. La originala eldono estis relative malmultkvanta kaj la libro estis malelegante prezentita. Kvardek kvin jarojn poste, en 1977, aperis en Kopenhago dua kaj multe pli luksa eldono. Kaj fine, en la jaro 1992, la romano publikigiĝis en Rusujo mem, ĉe la eldonejo Sezonoj.

Ekzempleron de tiu tria eldono mi akiris en 1999, dum la berlina Univerŝala Kongreso, kaj post sufiĉe longa prokrasto mi legis ĝin.

La volumo estas plaĉe bindita, sed la kompostado kaj presado estas nur mezkvalitaj. Tamen kio multe pli gravas, tio estas, ke la libro enhavas sapaĝan enkondukon, verkitan de Nikolaj Sepanov, pri la romano kaj ĝia aŭtoro; sespaĝan postparolon ate⁴ la redaktinto, Aleksander Korĵenkov, pri la lingvaĵo de Varankin kaj pri la korektoj faritaj dum la redaktado; kaj kvin paĝojn da klarigoj pri diversaj nomoj kaj esprimoj, kiujn en la teksto la redaktinto kursivigis. Al la enkonduko mi ŝuldas preskaŭ ĉion, kion mi scias pri la historio *kaj* de la romano *kaj* de Varankin mem.

La strukturo de la romano estas

1. “Metropoliteno” = subtera fervojo. — (db)

2. = sindediĉo. — (db)

3. = je. — (db)

4. = verkitan de. — (db)

iom komplika, ĉar la verko laŭiras du plimalpli paralelajn intrigojn. Juna rusa inĝeniero, vizitante Berlinon en la jaroj 1928 kaj 1929 por studi la konstruon de metropola subtera fervojo, skribas taglibron; kaj tiu unuapersona rakonto konsistigas la skeleton, aŭ eble pli ĝuste la ŝelon, de la verko.

Tamen en la taglibro la sennoma skribanto rakontas pri sia verkado de romano, kiu temas pri vizito al Berlino de juna sovetia inĝeniero, nomita Vitalij, por studi la konstruon de “metropoliteno”. Kaj la plimulto de la libro konsistas el la evoluenta teksto de tiu romano, traplektita per ofte longaj enskribaĵoj el de¹ la taglibro kaj fine (amenau ĉe la unua ekvido) okupanta sola, sen interrompo, la duan parton de la verko, nome la lastajn okdek unu paĝojn el sume ducent tridek sep.

Kaj en la taglibro kaj en la interna romano, troviĝas forta biografia elemento, ne kiom koncernas inĝenieraj-ojn, sed ja kiom koncernas la personan historion de Varankin, kaj liajn edzinon kaj filineton, kaj liajn spertojn dum eventoplenaj jaroj en Sovetrespubliko.

Laŭ la postparolo de la redaktinto, krom la korektado de preseraroj troviĝantaj en la unua eldono kaj de eraroj evidente rezultintaj el aŭtora preteratento, oni opiniis dezirinde fari lingvajn korektojn en ne malpli ol dek naŭ kategorioj: vorto *aŭ* misliterumita (ekzemple *defekto*) aŭ neekzistanta (*grimi* anstataŭ *ŝminki*); semantike malĝusta vortelekto (*aŭtomasi* anstataŭ *aŭtomobilo*); malĝusta vortkunmetado (*kvinjaro*); uzo de transitiva verbo kiel netransitiva (*ĉagrenigi*); la malo (*enmiksiĝi ion*); uzo de indikativo anstataŭ kondicionalo (*kvazaŭ nenio*

okazis); uzo de indikativo anstataŭ volativo (*ĉu vi deziras, mi metos la tekruĉon*); eraro pri nombro (*tridek unu procento*); superflua artikolo (*al la nia taĉmento*); manko de artikolo (*enigis en dorson*); malĝusta aŭ superflua uzo de *ĝi* (*kiu ĝin kriis kaj ĝi estas bone*); uzo de *nek* anstataŭ *ne...eĉ* (*li faras nek unu movon*); uzo de *ni kun* anstataŭ *mi kun*, kiam temas pri du personoj (*ni kun la patrino*); malbona elekto de prepozicio (*afero kun loĝejo*); preterlaso de *ke* (*mi komprenis, vi parolis pri...*); mislokado de *ankaŭ* (*mi ankaŭ petas pardonon*); erara uzo de adverba finaĵo (*ĝi estas interese*); nekonsekvenca ortografio de rusaj nomoj (*Nikolaeviĉ*); kaj erara transskribo de nerusaj nomoj (*Gindenburg*).

Malgraŭ la longeco de tiu listo, la redaktinto asertas, ke “sufiĉe multaj pekoj kontraŭ la gramatiko estis lasitaj senŝanĝe [tiele] ankaŭ en la nuna eldono por ne damaĝi la stilon kaj enhavon de la romano” (ĉe paĝo 252). Do, kion oni povas diri pri tiuj stilo kaj enhavo?

Nu, la paralela evoluigo de du similaj intrigoj, unu ene de la alia, estigas en la menso de la leganto iom da konfuzo; kaj oni eĉ demandas al si, ĉu de tia konfuzo ne suferis iomete Varankin mem. En la baza taglibro, ĉe la fino de la unua parto de la romano, la ĉefrolulo skribas:

Ĉi tie kunfluiĝas la pasinto kun la estanto. Sed la romano ne estas finita. Ĉu mi fariĝis Vitalij Zorin, aŭ inverse? Tio kaj alia! Nenio ŝanĝiĝas pro tio. Nur atentu: La romanon mi estas daŭrigonta en nomo de tria persono. Alie la legonto nenion komprenos.

Kaj efektive en la sekvanta dua parto la du rakontoj — tiu prezentita per la

1. el de = el. — (db)

taglibro kaj tiu evoluigita en la interna romano — kunfandiĝas. Germanino Alice, kiu en la taglibro reciproke enamiĝis kun la sennoma aŭtoro, aperas nun kun la sama rilato al Vitalij; kaj rolas en la dua parto, en la romano pri Vitalij, ankaŭ aliaj ge-germanoj, kiuj antaŭe aperis nur en la taglibro.

Tiu konfuzo tamen ne malpliigas la efikecon de la traktado ante¹ gravajn temojn el tiamaj Sovetunio kaj Germanujo, kaj ante¹ interpersonajn rilatojn. Detale kaj kun verŝajneco prezentigas klaskonflikto kaj stratbatalado en Berlino; longdaŭraj diskutoj en kunsidoj en Moskvo; kaj la siserva² konduto de tieaj burokratoj. Subtile prezentigas la rilatoj de Vitalij (kaj de la skribanto de la taglibro) kun siaj edzino kaj filineto en Rusujo kaj kun

sia amatino en Germanujo.

La verko ja estis pionira: la romano en Esperanto ankoraŭ junecis; kaj estas forte dubinde, ĉu Varankin ĝuis aliron al la ĵus aperinta *Plena vortaro*. Estas interese, ke li adoptis la francisman absolutan infinitivon, kiel ekzemple en “Se rigardi ĝin deekstere, ĝi aspektis fiera...” (ĉe paĝo 175).

Pro la laŭŝajna multtego de tekstaj ŝanĝoj faritaj de la redaktoro, oni hezitas taksu la lingvan stilon de Varankin. Tamen probable restas sufiĉe de la originalo por subteni verdikton pri lingva konservismo. Kaj certe la verko montras *kaj* viklecon *kaj* superordinaran priskriban povon. Se la legado postulas penadon, tio ne estas sen rekompenco.

[Ĉi tiu recenzo estis parto de ekzameno por la Klereca, de R.C. Gates. Ĝi estas reproduktita neŝanĝite. — [d]] □

1. = pri. — [d]
2. = sinserva. — [d]



POR RIDIGI VIN



Kiom da esperantistoj oni bezonas por ŝanĝi unu lampon?

Oni bezonas **1332** esperantistojn por ŝanĝi **unu** lampon tiamaniere:

- Unu esperantisto por ŝanĝi la lampon kaj informi en diskut-listo ke la lampo estis ŝanĝita;
- 14 esperantistoj por priskribi aliajn similajn eksperimentojn en la Centra Oficejo de UEA;
- 7 esperantistoj por averti pri la riskoj je la ŝanĝado de lampoj;
- 27 esperantistoj por montri la gramatikajn erarojn en la ret-mesaĝoj pri la ŝanĝado de lampoj;
- 53 por ataki tiujn kiuj korektis la gramatikajn kaj ortografiajn erarojn;

- 156 por skribi al la administranto de la listo plendante pri la kvanto de ret-mesaĝoj en la diskut-listo kaj por diri ke la temo ne estas taŭga en la listo;

- 41 por korekti la ortografion de la retmesaĝoj kiuj atakis tiujn kiuj korektis la ortografion, por citi *PIV*-on kaj por informi pri la diferencoj inter lampo, lampiro kaj lampiono;

- 109 por informi ke la diskut-listo ne estas pri ŝanĝado de lampoj kaj proponante la kreon de speciala diskut-listo pri la afero;

- 111 por skribi ke ĉiuj esperantistoj ŝanĝas lampojn, kaj tial la diskutado pri la temo estas taŭga;

- 306 por rebati pri la plej bonaj metodoj por ŝanĝado de lampoj kaj pri la plej bonaj lampoj en la merkato;

- 27 por sendi adresojn de hejm-paĝoj

kie eble oni trovas la plej bonajn lampojn kaj por informi ke en la libro-servo de UEA estas verkoj pri la temo;

- 103 por plendi pro tio ke la amasa samtempa sendado de ret-mesaĝoj pri ŝanĝado de lampoj, pri gramatiko kaj ortografio devas tuj halti;
- 14 por plendi ke la senditaj ret-adresoj de la hejmpaĝoj (URL) estis malĝustaj, ke ili ne sukcesis vidi la paĝon, kaj peti ke oni sendu ĝustajn ret-adresojn;
- 3 por skribi pri la ret-ligoj pri lampoj trovitaj kaj por aserti ke la temoj de tiuj hejm-paĝoj rekte rilatas al celo de la diskut-listo kaj, do, la temo “ŝanĝado de lampoj” estas temo kiu rilatas al la listo;
- 33 por aldoni ĉiujn jam senditajn retmesaĝojn pri la temo, ripetante la tutan tekston (inkluzive kun la propagandoj kaj koncernaj informoj pri la listo) nur por aldoni la frazon: “Tre bone”;
- 31 por informi ke ili estas forlasontaj la diskut-liston ĉar ili ne plu eltenas la ret-mesaĝojn pri ŝanĝado de lampoj;
- 4 por sugesti la verkadon de scienca eseo pri ŝanĝado de lampoj aŭ pri prelego en la Universala Kongreso pri la temo;
- 1 por sugesti novan diskut-liston pri ŝanĝado de lampoj;
- 47 por sugesti ke la diskut-listo pri fiziko kaj atoma energio estas la plej taŭga diskutejo pri la temo (ŝanĝado de lampoj) kaj por informi ke en Vjetnamio estas fak-delegito pri ŝanĝado de lampoj;
- 90 por kritiki la ret-mesaĝojn kiuj ripetatas la aliajn mesaĝojn kiuj nur aldonas la frazeton: “Tre bone”;
- 43 por apogi la ideon pri kreado de diskut-listo pri lampoj kaj kreado de

faka asocio;

- 110 por ripeti ĉiujn ret-mesaĝojn pri plendoj pri ret-mesaĝoj kiuj ripetatas ĉion kaj aldoni “Tre bone”, kaj skribi en la fino nur: “Mi ankaŭ taksas tion absurdaĵo”;
- kaj finfine unu esperantisto por peti konfirmon ĉu la sumo de ĉiuj esperantistoj estas vere 1332, kiel estis en la komenco informite.

João Manoel Aguilera

Mi ne kunsentas kun João; oni bezonas 1333 esperantistojn por la afero, ĉer mankas en la listo persono kiu aperigas la informon en Esperanto-gazeto. :-) - ndlr.

[El *Eventoj*]

Pri la adverba participo

Ablativo absoluta estas speciala formo, uzata nur en kelkaj tre malmultaj lingvoj; en Esperanto ĝi *ne* ekzistas. Kvankam ĝi nenie estis rekte malpermesita, tamen ĝia uzado estus kontraŭ la spirito de nia lingvo. En Esperanto la adverba participo ĉiam rilatas la subjekton de la ĉefa propozicio. Sekve oni povas diri “farinte (= kiam la *leono* faris) la dividon, la *leono* diris”, sed oni ne povas diri “la divido estante farita (= kiam la *divido* estis farita), la *leono* diris”. Enkonduki la latinan aŭ francan ablativon absolutan (kiu por la plimulto de nacioj prezentus ion nenaturan) ni tute ne bezonas, ĉar ni *ĉiam* povas ĝin anstataŭigi per formo pli natura. En via frazo (“la reĝo kunvokis siajn konsilistojn, por ke, *ĉiu el ili eldirante sian opinion*, li povu fari decidon”) ni povas ja tute bone anstataŭigi la substrekitan esprimon per “kiam ĉiu el ili eldiros sian opinion”, aŭ per la pli mallonga “aŭdinte la opiniojn de ĉiuj”.

L.L. Zamenhof
Linguvaj Respondoj

For the Beginner

Word of the month:

elŝuti

This is a computer word used where the English word is “download”. It is made from *ŝuti* “to pour out (grain etc.)” and *el* “from, out of”. It refers to copying material from the Internet into your own computer. The Esperanto image is that of the Internet being a large container from which you pour out into your computer stuff that you want.

Unicode:

This is a system for writing any script used by any language in the world. For Esperanto users it is particularly useful since it makes it possible to write the Esperanto letters (ĉ, Ĉ, ĝ, Ĝ, ĥ, Ĥ, ĵ, Ĵ, ŝ,Ŝ, ŭ, Ŭ) on any computer, in e-mail messages, or Internet pages. Whether you use Windows or Macintosh OS X on your computer, your computer comes ready to use Esperanto as soon as you plug it in.

In our last issue (*ENK* March-April, 2002, p.23) we told Windows users how to use the Esperanto letters in Microsoft Word. Internet Explorer, Netscape, Mozilla, and Opera also use Unicode. For e-mail, Outlook Express does not enable writing in Unicode, but the e-mail option in Microsoft Word 2000 does so..

Macintosh OS X comes with its own e-mail program (appropriately named MAIL). To write the Esperanto Unicode letters merely press option-6 and then the letter concerned (c, C, g, G, etc.) or for ŭ press option-b and then u. Omni-Web, Opera and Mozilla all use Unicode. You do not need special fonts to write Esperanto. They come already installed in Windows 95/98/2000/XP and Macintosh OS X, ready for writing in Esperanto and many other languages.

Simredo is a free little program which handles Esperanto via Unicode both on the Mac and in Windows. It can be downloaded from the Internet. Because the Net address is rather complicated, we suggest you use Google to search for Simredo and have it direct you to the download page. Note that you will also need to download the little program called *Vortaro* as well, from the same page. To write Esperanto in Unicode, write ĉ as cx or ch, ĝ as gx or gh, etc. Then when you are finished typing your text, in the “Esperanto” menu at the top of the program window choose “Konvertado” kaj tell it to convert your text to Unicode. It then magically changes your cx or ch, gx or gh, etc. into the proper Esperanto letters.

Simredo has only the very basic word processing functions, but does them well, in Windows 2000 (and presumably in Windows 95/98/XP, though we have not tested it in these). On the Mac, the copy, paste, and cut functions do not work

properly in Simredo.

ThinkFree Office, on the other hand, is a fully featured Unicode-using word processing, spread sheet, and graphics capable program for Mac OS X. This program writes Unicode using the normal OS X method. At US\$60, it is very good value. Incidentally, it can save documents in MS Word format, and can open MS Word documents. ThinkFree Office is available by download from the Internet, and takes up just under 16 megabytes of space on your hard drive. You can find it at www.thinkfree.com, from which a copy can be downloaded and tried out for 30 days (after which a registration code must be purchased from the same site in order to keep using the program).

The same program is available in a Windows Version, but though it permits use of Unicode, the Windows version has no automatic method of using the Esperanto letters. For this purpose it is necessary to use the free Esperanto keyboard facility for Windows 95/98 available from the editor of this journal, or a supplementary program such as Supersigno.

Baza and Meza Examinations

Those interested in doing these are advised to contact, for information and to arrange time and place:

in Sydney: Edna Turvey, 36 Calder Rd, Darlington NSW 2008

In Melbourne: Ken Rolls, 31 Miller Cresc., Mt Waverley Vic 3149

In Brisbane: Hazel Green, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401

in Adelaide: Bob Felby, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019

in Perth: Debra McCarney, 46 Chichester Way, Nollamara WA 6061

Active Voice and Passive Voice

by Marcel Leereveld

A simple sentence consists of four different parts:

1^a The **subject**, about which we are going to give more information, especially what it does, e.g. *La granda hundo de la najbaro bojas*.

2^a The **verbal part**, which consists of one verb, or a combination of words, telling us what the subject does, e.g. *La hundo ne volas silenti; ĝi restas bojanta kaj brua*. The action done by the subject can be quite inactive: *Mi ricevis leteron; Ŝi stumblis kaj falis; La opero finiĝos baldaŭ; La aŭto jam purigatis de mia filo; Ili restis starantaj, nemoviĝantaj, kaj tute silentaj*.

3^a The **object**. Some verbs must be followed by an **object** to make sense, e.g. *Mi ricevis leteron* (just *Mi ricevis* would not make sense). Other verbs **can** have an object: *Ni manĝis pantranĉojn kun fromaĝo*, **or** we can also leave out the object: *Je la sesa vespere ni manĝos*. But there are some verbs which cannot have

an object, such as *Ŝi dormas trankvile; Li ŝajnas dormanta kaj laca.*

4^a The adjuncts. The parts under 1^a, 2^a, and 3^a give us the core of the mental picture transferred by language. The picture of this core can be enlarged by the addition of different types of circumstances. Each of the circumstances, such as time, place, reason, purpose, etc., is called an *adjunct* (in Esperanto: *adjunkto*). There can be any amount of them in one sentence, e.g. *Li promenas en la parko; Mi donis la libron al ŝi; Ili estis endome dum la tuta tago.*

In Esperanto, like in many languages, instead of focusing first on the subject doing the action, as in *Mia frato riparos la aŭton jaŭdon*, we can describe a normal picture by focusing first on the object that is having something done to it, as in *La aŭto estos riparata de mia frato jaŭdon*. When we do that, from the grammatical point of view the original object of the action (*La aŭto*) becomes the new subject of an action, and the original subject who was doing the action (*Mia frato*) becomes a new adjunct, preceded by the word *de* (“by”): *de mia frato*. The original verb (*riparos*) has, of course, to be changed to show that we are looking at the picture backwards: *car* → *repair* → *my brother* (“The car will-be-repaired by-my-brother”). This way of giving information is called the “Passive Voice” — The normal way, “*my-brother* → *repair* → *car*”, is called the “Active Voice”.

To show the new focus, which is now on the Object, the verb can in Esperanto be changed in two ways:

1^a We can change the original verb into a so-called “adjectival participle” (*riparata*) and combine it with a form of *esti* (or *resti* or *iĝi*): *estos riparata* or *estas riparota*.

2^a A more modern way is to change the active form *riparos* into a single passive form by means of the suffix *-ati*: *La aŭto riparatos de mia frato jaŭdon*. Note that in the Passive Voice there is never an object, only a subject. Subject: *La aŭto*. Verb: *riparatos* or *estos riparata*. And adjuncts: *de mia frato* and *jaŭdon*.

Since only Transitive Verbs (see the March-April issue of *ĜK*) can be accompanied by an object, Intransitive Verbs like *iri*, *dormi*, *sidi*, cannot be changed into the Passive Voice. You cannot change *Ŝi dormis la tutan nokton* (subject—verb—adjunct) into a passive *dormatis* or *estis dormata*.¹

For English speaking Esperantists there are three small problems:

1^a Although most English transitive verbs are also transitive in Esperanto, there are a few exceptions:

English Transitive

She contributed five dollars
They rode their horses too fast
I trumped the last suit

Esperanto Intransitive

Ŝi kontribuis per kvin dolaroj
Ili rajdis sur siaj ĉevaloj tro rapide
Mi atutis sur la lastan kartlevon

1. At first glance the *-n* on *la tutan nokton* might mislead you into thinking that it marks the direct object of a verb. But actually *la tutan nokton* is shorthand for *dum la tuta nokto*, one of the traditional ways of indicating lengths of time. —[d]

They climbed the mountain

Ili grimpis sur la monton

None of these Esperanto sentences can be made grammatically passive: “The mountain was climbed by them” has no word for word translation into Esperanto.

2^a As a rule English intransitive verbs cannot be changed into the passive — for example we cannot change “I went to the market” into “The market was gone by me”. However, there are some intransitive English verbs which when followed by prepositions (words such as “after”, “for” “into”) do become passive. For example: “She looked after the dog” can become “the dog was looked after by her”. This sort of usage is specific to English, and does not follow any rule.

It is important to know that such changes are not possible in Esperanto. *Ŝi kuris post la hundo* **cannot** be changed into “la hundo estis kurata/kuratis de ŝi post.”

But some Esperantists change the intransitive verb into a new transitive verb by using the preposition as a prefix to the verb:

Mi grimpis sur la monton → *Mi surgrimpis la monton*

and this **can** be changed into the passive:

La monto estis surgrimkata / surgrimkatis de mi.

This procedure is not often used but it is legitimate and without exceptions.

3^a Normally it is the direct object of an action which becomes the subject in a Passive statement. But in English, unlike other languages, a special adjunct which in English is called an “indirect object” can become the subject. For example,

He gave a book to me → *A book was given to me by him* → *I was given a book by him*

This last sentence, “*I was given a book by him*” cannot be translated word for word into Esperanto.

In English there is an easy way to find out whether a part of a sentence is a direct object or an adjunct (indirect object, in this instance). If one can say the same sentence in two different ways, the part that can be both with or without the word “to” is the *indirect* object and cannot become a subject in a passive sentence in Esperanto.

So if you are unsure whether an English passive can also be used as an Esperanto passive, transform it first into the active form, and then apply the “with-and-without” rule:

She was told a lie by her colleague → *Her colleague told her a lie* → *Her colleague told a lie to her*

Since we can say both “her” and “to her” in the sentence, it is an indirect object and the Esperanto must follow the Esperanto rules:

Mensogo estis dirata al ŝi or *Mensogo diratis al ŝi.*

□

NZEA Kongreso 2002 en Wellington



16 19 20 21 22 17
11 12 13 4 15 14 7
1 2 3 14 5 6 8

- | | | |
|---------------------|----------------------|-----------------------------|
| 1. Betty Batt | 9. Frank Swift | 17. Dave Dewar |
| 2. Joyce Hill | 10. Kevin Warburton | 18. Jackie Fox |
| 3. Tomoko Yoshinaga | 11. Julie Regal | 19. Tonny Jansen |
| 4. Pat Palmer | 12. Mary Richardson | 20. Howard Gravatt |
| 5. Ron Gates | 13. Bradley McDonald | 21. Ross Moore |
| 6. Barbara Gates | 14. Donald Rogers | 22. Kelly Buchanan |
| 7. Tereza Kapista | 15. Erin McGifford | 23. Brian Fox |
| 8. Jo Horton | 16. Daphne Lawless | Ne fotita: Sandor Monostori |

kompilita el raportoj de Donald Rogers kaj Howard Gravatt

Temo: *Solidareco en Esperantio*

Nia kvartaga kongreso komenciĝis je la 29a de marto 2002. Ĉeestis entute 26 geesperantistoj, kelkaj el eksterlande. La elektita loko estis en la antaŭurbo ISLAND BAY, kiu frontas trans la markolo de Cook al la Suda Insulo.

Donald Rogers legis al la ĉeestantoj salutmesaĝon de Wu Guojiang, vicprezidanto de Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio.

Multe da tempo dum la kongreso Tereza Kapista laboris kun malgranda grupo da progresantaj kaj novaj kaj malfluaj esperantistoj laŭ la Cseh-metodo. Kaj kiel bonfortunaj ili estis havi tiel kleran instruistino!

Unu el la celoj de ĉi tiu kongreso estis plibonigi nian scion de Esperanto. Pro tio ni aranĝis por la lingvaj sesioj dividi la kongresanojn en du grupojn. Unu grupo havis Paroligan Kurson

gvidatan de Tereza Kapista el Beogrado. Helpis en ĝi ankaŭ Ross, Frank Swift kaj Gwenda Sutton. Ĝi celis la nefluajn parolantojn. La aliaj partoprenis la Lingvan Seminarion.

En la unua sesio de la Lingva Seminario, Brian Fox parolis pri la tradukarto kaj precipe pri la tradukado de slanga angla en nov-zelandaĵoj kaj romanoj kaj noveloj. Li substrekkis ke necesas poluri tradukaĵojn dum sufiĉe longa periodo por doni kiel eble plej bonan rezulton. Li postulis ke ni unuope traduku elĉerpaĵojn verkitan de nov-zelanda aŭtoro Frank Sargeson. Dimanĉe ni revenis al ĝi kaj diskutis la diversajn versiojn kiujn ni faris. Estis evidente ke ne estas facile traduki tian verkon, pro la slango. Se oni tradukas la signifon oni plej ofte perdas la naivecon de la originalo.

Aŭstraliano Ron Gates, aŭtoro de pluraj esperantlingvaj romanoj, paro-

lis pri krea verkado (Lingva Seminario 2). Li priparolis du metodojn verki fikcion: (1) elpensi la tutan strukturon de la romano kaj poste ekverki ĝin; kaj (2) legi kelkajn detektivajn romanojn, imagi scenon, ekverki kaj lasi la historion evolui kvazaŭ ĝi havas propran impulson. La unua metodo estas pli efika sed la dua estas pli ĝuiga. Verkanto bezonas lokon, tempon, rolantojn, solvon, malnodigon kaj titolon. En la unua metodo decidu antaŭe; en la dua laŭvoje.

Ron prezentis al la aŭskultantoj la komencon de novelo/rakonto. La scenon li prenis el la kurso *Jen Nia Mondo*, sed la loko estis aŭstralia kamparo:

“Rigardu! Rigardu!” Helena kaj Petro veturas, flava sportaŭto pasas rapidege, poste karambolas en riveron. Enmiksiĝas la ŝtelinto de la aŭto, kaj du policianoj.

Ron lasis la rakonton nefinita kaj postulis ke la seminarianoj individue elpensu daŭrigon kaj finon por prezento post du tagoj. Dimanĉe ĉiu legis sian elpensaĵon. Interese, iuj daŭrigis la fadenon jam priskribitan, kaj aliaj enkondukis tre fantaziajn ideojn.

Sabate Donald parolis al la Lingva Seminario pri kelkaj aspektoj de esperantaj verboj, precipe pli tiklaj punktoj pri la medialaj kaj faktitivaj verboj. Lunde li instigis la ĉeestantojn pensi pri diversaj “Kuriozaj Demandoj” pri la lingvo Esperanto, kie la situacio ne estas tia kia ĝi eble ŝajnas. Ekzemple li starigis antaŭ ili vicon de tasego, malgranda botelo, bokalo, du malsamformaj plastaj trinkujoj sen tenilo kaj florzovo. Kiom da ili estas vazoj? Nur unu-du anoj sciis ke ĉiuj ses estas vazoj, ĉar “vazo” estas ĝenerala termino

(vidu *PIV*-on). Kion ni nomu paperan ujon (samforman kiel glaso) en kiu oni aĉetas frititajn terpompecojn? Ron proponas ke ĝi estas skatolo.

Bradley enkondukis trisesian diskutadon pri la kongresa temo “Solidareco en Esperantio” kaj planado por la estonteco de nia landa asocio, Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. La ĉefaj fakoj estas informado, instruado kaj utiligado, same kiel en la plano de UEA. La antaŭa strategia plano de NZEA en 1999 enhavis tri ĉefajn agadojn plenumendajn: (1) informado, (2) vigligo de la ekzistantaj kluboj, (3) buĝeto por aperigo de flugfolioj, gvidlinioj por kluboj kaj aliaj aferoj.

Bradley diris ke la asocio ŝrumpis de pli ol 300 membroj antaŭ 20 jaroj ĝis la nunaj 60. Mankas sufiĉaj novaj lernantoj.

Nunaj agadoj baziĝas sur kunlaborado kun aliaj grupoj de Esperantistoj, ĉefe Aŭstralia Esperanto-Asocio, Indiĝenaj Dialogoj, Komisiono pri Oceanio, kaj *Esperanto sub la Suda Kruco* (komuna gazeto de AEA kaj NZEA). Nia propra TTT-ejo estas jam sufiĉe evoluigita: www.geocities.com/esperanto-nz/. Ekzistas taŭgaj kursoj en Interreto, kiujn ni povas prezenti al interesitoj, precipe la brazila *Kurso de Esperanto*. Estas malfacile instigi ĵurnalistojn raporti pri Esperanto dum ni vere ne havas ion novan kaj raportindan. Aperis artikolo en la ĵurnalo *The Dominion* antaŭ nelonge, raportanta pri la kurso por komencantoj en Wellington kaj ĉi tiu kongreso. Eble ĉi tiu monato pli konvenas por raportistoj ol frua januaro kiam multaj homoj ferias.

Pri informado ni konsentis ke pagi reklamojn estas monmalŝparo. Ni dependas de UEA, ke ĝi enmetu novaĵojn

en la internaciajn komercajn novaĵ-retojn. Radiosesioj kie homoj povas telefone babili kun la gastiganta ĵurnalisto dum oni aŭskultas estas uzindaj kaj senpagaj (ekzemple Radio Pacifika). Interreto estas taŭga rimedo, malmultekosta, sed ni bozonas freŝan informon kiel plej ofte, kaj almenaŭ parto celu gejunulojn. La lastajara projekto ĉe IOU-Help komenciĝis sed ne maturiĝis.

Se ni havus membrojn ankaŭ en taŭgaj aliaj organizoj kiuj utiligas Esperanton tio eble helpus: ekzemple Ĝemelaj Urboj, Verduloj, Skoltoj, Baha'i, Amnestio Internacia, grupoj pri homaj rajtoj, UNANZ, k.a.

En la dimanĉa diskuto ni konstatis ke multaj el ni interesiĝis pri Esperanto ĉar lingvoj interesas nin. Tamen por iuj aliaj turismo aŭ internaciismo estas la ligo kun Esperanto. Ni plejparte ne estas finvenkistoj; ni uzas Esperanton nun. Ĝi estas utila en Interreto, korespondado, babilejoj en la reto, radio, muziko ktp.

Tereza parolis sabate al la tuta ĉeestantaro pri Esperanto tra la mondo, siaj vojaĝoj, spertoj, instruado dum la lastaj 16 jaroj. Lunde ŝi parolis pri sia amiko Tibor Sekelĵ, esperantisto, muzeologo, vojaĝanto. Estas evidente ke li estis tre talenta homo.

Distraj aferoj okazis vespere. Vendrede David Dewar preparolis vojaĝon kun sia edzino al Japanio. Tereza parolis pri vizito al Pompeii kaj montris lumbildojn. Multaj bildoj temis pri la erupcio en 79 a.K. kaj la terura morto de la viktimoj.

La jarkunveno de la Asocio okazis en du partoj, dimanĉe kaj lunde. La kutimaj aferoj okazis: raporto de la Estraro, elekto de oficistoj. La Estraro nun havas novan membron: Daphne

Lawless, studento kaj muzikisto

Sabate vespere Ross montris du vidojn: unu estis historio de la Nov-Zelanda Sovaĝviva Servo, kiun ni dublis en Esperanto dum kongreso en Masterton antaŭ kelkaj jaroj. Ross demandis ĉu oni rekonis la du voĉojn: tiujn de Donald Rogers kaj Johano Rapley (kiu nun loĝas en Francio). Poste Tereza prezentis teatraĵeton pri virino kiu dubas la edzon (tiun rolon ludis Ross sen la bezono diri eĉ unu vorton!).

Dimanĉe Dennis Pease legis du humorajn rakontojn. Erin McGifford, David Dewar kaj Frank Swift rolis en teatraĵeto *Cindrulino*, adaptita por fea baptopatro kaj svatanto kiu estras revolucion kiu renversas la situacion kaj kontraŭ la princo kaj kontraŭ la malbona stifpatrino. La heroino akceptas edziĝproponon de la revolucianto.

Poste tio Daphne kantis al ni tri el siaj esperantaj verkoj akompanante sin per piano. Poste Pat Palmer kantis kelkajn kantojn en Esperanto.

Dum la lasta vespero ni kune bankedis en taja restoracio. La manĝaĵo estis bonega kaj la kongresanoj babilis ĝis malfrue. La neformala fino de sukcesa kvartaga kongreso. □

Lingva Konsilo

Pri la formo "ĉio ĉi"

Anstataŭ "ĉio tio ĉi" vi povas tre bone diri "ĉio ĉi", ĉar la vorto "ĉi" jam per si mem signifas proksiman montron.

L.L. Zamenhof
Lingvaj respondoj

La evoluo de Esperanto

de Marcel Leereveld

Oni diras, ke etnaj estas naturaj lingvoj. Tio ne estas tute vera: etna lingvo estas sufiĉe natura ĝis ĝi aperas en skribita formo, kaj eĉ antaŭ tio ekzistas kelkaj nenaturaj influoj, kiaj la popolkantoj kaj la religiaj diraĵoj, kiuj iometgrade malhelpas la naturan evoluon. La skribita formo pli potence malhelpas la naturan evoluon, kvankam nuntempe ĝi parte ankaŭ helpas.

La evoluo de etna lingvo konsistas el ŝanĝiĝoj, el novaj vortoj el aliaj lingvoj, kaj iomete el novaj vortoj faritaj el la propra lingvo. Etna lingvo plie ŝanĝiĝas en la signifoj de siaj vortoj, en sia skribmaniero, kaj en la sonoj uzataj por formi la vortojn. La gramatikaj reguloj fariĝas ofte malpli striktaj kaj ricevas pli kaj pli da esceptoj, kaj tre malofte plireguliĝas. La nocioj reprezentataj de la lingvo, pleje de la vortoj, plimultiĝas relative mal multe, eĉ en nia moderna mondo teĥnika. La naturo kaj la homoj restas preskaŭ la samaj, la homaj bezonoj kaj sentoj tre mal multe ŝanĝiĝas, kaj novaj teĥnikaĵoj ĝenerale anstataŭas malnovajn, kies vortojn oni plu uzas por la novaĵoj. Cetere la ŝanĝiĝoj estas nur kosmetikaj, nenecesaj kaj dependaj de necertaj kaj kapricaj arbitraĵoj.

Esperanto ne kreigiĝis: ĝi kreas, kaj plu kreas, por esti pli uzebla ol etnaj lingvoj en internacia komunikado. Etna lingvo estas malfacile uzebla en tiu tasko, kaj Esperanto multe superas pro la sekvaj kialoj:

1) ĝiaj gramatikaj reguloj kaj aplikado estas multe pli simplaj kaj sen-

esceptaj;

2) ĝiaj sonoj estas klare distingeblaj;

3) la lernenda vortotrezoro estas multe pli malgranda, ĉar oni mem regule kreas la plej grandan parton de la necesaj vortoj el la malmultaj vortoj bazaj;

4) la signifoj de la vortoj ne ŝanĝiĝas; kaj

5) la vortoj mem ne ŝanĝiĝas, nek la gramatikaj reguloj, nek la ortografio nek la prononcado.

Alivorte: la lingvo estas facile lernebla kaj facile komprenebla en la tuta mondo kaj ĝi estas fidebla pro sia neŝanĝiĝado de vortoj kaj de signifoj.

La kialoj de la plitaŭgeco de Esperanto super etnaj lingvoj estas la supre menciitaj karaktereroj. Por daŭrigi la taŭgecon de Esperanto, ĝian plibonecon super aliaj lingvoj, kaj eĉ ĝian ekzistorajton, ni devas do:

1) *ne* ŝanĝi la gramatikajn regulojn simplajn, nek krei esceptojn ĉe tiuj reguloj;

2) *ne* ŝanĝi la sonojn de la vortoj;

3) *ne* plimultiigi la bazajn vortojn lerneblajn;

4) *ne* uzi la nenecesajn neologismojn (= neoficialaj vortoj);

5) *ne* ŝanĝi la signifon de la vortoj;

6) *ne* ŝanĝi la vortojn nek la ortografion.

Kompreneble oni povus iomete plibonigi la lingvon, sed tio detruus Esperanton, ĉar cent homoj havas cent diversajn ideojn pri kiel plibonigi. Neniaj unuecaj akceptado rezultus. Kaj la eventualaj pliboniĝoj estus tre

malgravaj kaj la manko de pliboniĝoj ne kreas miskomprenon nek igas la lingvon esti pli malfacile lernebla.

Sed kio pri la evoluo de la lingvo? Nu, naŭdek procentoj de la “evoluo” de la etnaj lingvoj estas nur nenecesaj ŝanĝiĝoj, ne pliriĉiĝoj. Niaj nocioj apenaŭ pliriĉiĝis en la lastaj milionoj da jaroj. Kio ŝanĝiĝis estas niaj teknikaj inventoj.

Por trakti la malgrandan plimultigon de la teknikaj nocioj ni agu jene:

- 1) Por preskaŭ ĉiuj novaj (teĥnikaj) nocioj oni uzu vortojn faritajn el vortoj bazaj, jam oficiale ekzistantaj en la lingvo. Ekz. *vagonaro*, *malsanulejo*, *ekigi* = to launch).
- 2) Latin/grekaj nomoj por animaloj, plantoj, ŝtonoj, ktp. estu uzataj (kie por ili ne jam ekzistas bazaj vortoj), ĉar internacie fideblaj kaj ĉe Esperantigo kaŭzantaj grandegan multobligon de la bazaj vortoj.
- 3) En la malmultaj kazoj, en kiuj novaj nocioj bezonas tre longajn aŭ apenaŭ kompreneblajn vortojn se kreitaj per bazradikaj kunmetoj, aŭ bezonas uzon de pluraj apartaj vortoj, nova vorto kreatu per transpreno ante korespondan vorton el alia lingvo. Ekz. *aidoso*, *judo*, *flaĝo*, *feldspato*.

Krome, kie en la origina aŭ posta Esperanto ĉeestas eraroj (ĉar ili ne konformas al ĝenerallingvaj postuloj aŭ al la karaktero de Esperanto), tiuj eraroj korektatu nur se tio eblas per la uzo ante la bazajn vortaron kaj gramatikon de Esperanto mem. Ekz.: la baze Esperanta “elrigardi” ne plu uzatu, kaj nun ŝanĝatu al la baze Esperanta “aspekti” per alikategoriigo el la substantivo “aspekto”; la uzo de “de” por la aganto (*tiu poemo de la po-*

eto) kaj por la priagato (*la poeto de tiu poemo*) ĉesu kaj oni anstataŭe uzu la korespondajn formojn “ate de” resp. “ante (al)” kreitajn el la baza vortaro (sufiksoj) de Esperanto mem.

Kelkaj komentoj de Donald Broadribb

Preskaŭ pri ĉiu punkto mi samopinias kun Marcel rilate al lia ĉisupra artikolo.

Estas interese, kaj iom malĝojige, vidi kiom da “neologismoj” estas kreataj de esperantistoj, ŝajne nur por kredi ke ili estas avangardaj pro sia pseŭdoesperantigo de anglalingvaj (kaj ofte pseŭdoanglaj) vortoj. Kion alian ni konkluzu pri la monstraĵo “vindoza” nun ĝenerala uzata de la monda esperantistaro? La vorto estas pseŭdoesperantigo de la anglalingva vorto “Windows”, t.e. la nomo de la komputilsistema programo fabrikata de la kompanio Microsoft.

Ja Microsoft uzas la anglalingvan vorton “Windows” por indiki ke la programo faras “fenestretojn” tra kiuj oni povas vidi la enhavon de komputildokumentoj — bela analogio celanta hejmsentigi la uzantojn de komputiloj — sento plene nuligita per la pseŭdovortaĉaĵo “Vindoza”.

En la angla, tiaj analogioj abundas, kaj ankaŭ donas ĉarmon al la lingvo. Ĉu vi pensis pri la anglalingva verbo “store” (konservi/tenadi)? Ĝi estas uzata ne nur kiel verbo kaj kiel substantivo normala, sed substantive ankaŭ por la senco “konservejo/tenejo”, do “butiko”, kiel ankaŭ “provizajaro” ks.

Iom interese estas ke tiu procedo plu okazas kaj ŝajnas fundamenta en la angla lingvo. Ekzemple, dum mia infaneco margarino anglalingve estis nomata *oleo*; poste la kutima vorto es-

tis *margarine*. Sed nuntempe la produktantoj preferas etikedi ĝin simple “*spread*” (ŝmirajo).

Kiam oni legas la verkojn de Zamenhof, estas klare ke li intencis ke Esperanto ankaŭ simile agu per sia vortprovizo.

Min iomete amuzas ke Marcel volas akcepti “aspekti”, kiu ne estas en la *Fundamento* sed estis oficialigita per la *Unua Oficiala Aldono*, sed li malakceptas “hospitalo”, kiu estis akceptita de tiu sama *Unua Oficiala Aldono*. Ĉu el inter oficialaj vortoj ni prenuijn sed malprenui aliajn?

Por kelkaj lingvokonfuzoj, tamen, kulpas malpli la lingvo kaj multe pli la senpensemo de verkantoj kiuj nepripensas ĉu iliaj skribaĵoj estas kompreneblaj. Neniu propono povas solvi la problemon pri la signifo de frazo kia ĉi tiu kiun mi legis en kasraporto: “La mono ricevita de la membroj”, en kiu estas neklare ĉu la membroj ricevis aŭ sendis la monon — grava demando, respondebla nur per tre detala traekzameno de la kontosumoj en tiu sama kasraporto.¹ Kulpas tie ne la lingvo, nek nia vort- aŭ gramatikprovizo, sed verkinto kiu tre mallerte vortumis sian tekston.

Komentoj al Komentoj de Marcel Leereveld

Mi ĝojas ke ankaŭ Don (kaj sendube aliaj) bedaŭras la ŝanĝigon de Esperanto al nova, neologismema, lingvo, precipe en Eŭropo. Li pravas, ke la ŝanĝemo baziĝas precipe sur la deziro

1. “Mono ricevita de...” normale signifas “money received by...”, sed en la kasraporto mi suspektas ke la kasisto volis esprimi “money received from...”. Por ne hontigi la koncernan kasiston, mi preferas ne nomi la specifan kasraporton en kiu mi legis tiun malfeliĉan frazon.

kapabli krei lingvon pli bonan ol Zamenhof faris. Alia tialo eble estas, ke multaj Esperantistoj estas tro pasivaj por krei novajn vortojn el ekzistantaj radikoj, kiel la angla nun faras tiom riĉe.

Don certe akceptas, ke mi agas pli rezisteme, pli fanatike, kontraŭ la ŝanĝoj, kaj tial eĉ daŭrigas uzi “mal-sanulejo” anstataŭ la nun oficiala “hospitalo” laŭ mi nenecesa. Ĉu ni ne rajtas elekti el la oficialaj vortoj? Zamenhof mem ja konsilis tion.

Mi ŝatus krii, laŭ analoga ekkrio de Zamenhof en la Dua Kongreso: “**Kun tia Esperanto**, kiun oni nun polucias per nenecajaj neologismoj kaj nelogikaj gramatikaĵoj, **ni volas havi neni-on komunan**”.

Ĉar Zamenhof diris, ke por indiki la originan aganton, oni uzu nur “de” post participaj adjektivoj (kaj adverboj) pasivaj, en *ricevita de* “de” post tiu participo ĉiam signifas “by”. Do se oni deziras alian signifon, ekz. “from”, oni uzu *el* aŭ *el de* aŭ *for de*. En *el de* la vorto *de* signifas ± *koncerne*, *apartenante al*. Cetere mi ĉiam uzas *el* aŭ *el de* por “from”. □

Pri Idiotismoj en Esperanto

Mi esperas, ke iom post iom ĉiuj idiotismoj malaperos kaj cedos sian lokon al esprimoj tute logikaj kaj internaciaj. Tamen laŭ mia opinio ni devas fari tiun anstataŭigadon nur en tia okazo, se ni povas tion ĉi fari tute *oportune*; sed en okazo, se por ni la idiotismo *ne* trovos pli bonan esprimon tute logikan, tio ĉi ne devas nin ĉagreni; kaj la idiotismo povas tute *oportune* resti kiel “esperantismo”, se ĝi nur estos komune *akceptata*.

L. L. Zamenhof
(En *Lingvaj Respondoj*)



Interrete



• **Esperanto en viaj e-poŝtaĵoj:** ŝajnas ke la plej multaj esperantistoj ne scias ke oni povas facile uzi la esperantaj literojn en ĉiu komputilo.

Windows: Microsoft Word 2000 mem inkludas provizon por verki kaj sendi e-poŝtajn mesaĝojn. Vi povas fari la esperantaj literojn en via e-poŝta mesaĝo sammaniere kiel en ordinaraj tekstodokumentoj en MS Word. Ĉi tiu metodo estas nur unu-foje fareda: en la Insert-menu elektu "symbol" kaj en la Symbol-menuo elektu "normal font". Tio donos al vi liston de ĉiuj haveblaj literoj, inkl. la esperantaj literoj. Elektu ĉiun el la esperantaj literoj, unu post alia, kaj asignu al ĝi deziratan klavpremon por aperigi ĝin sur la ekrano. Ni sugestas ke vi elektu alt-control-c por ĉ, kaj simile por la aliaj esperantaj literoj. Tiel vi evitos la eblon ke iuj programoj jam atribuas simplan alt-c (ks.) al alia funkcio.

Macintosh: en Sistemo OS X la enkonstruita programo nomita "Mail" akceptas fari kaj legi la esperantaj literojn. Premu option-6 kaj poste la koncernan literon (c, C, g, G, kc.)

* **Radio Kubo** nun aŭdeblas en Esperanto per Interreto, ĉe la adreso http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html Via redaktoro aŭskultis ĝin la 21an de februaro. La elsendo daŭris duonan horon. La sono estis ne tre kontentiga. Radio Aŭstrio surbendigas la ĉiusemajnan programon dissenditan el Kubo per mallongondoj, kaj enretigas ĝin. Kiam ni aŭskultis, mik-

siĝis kun la Esperanto-dissendo ankaŭ aliaj mallongondradiaj signaloj, kiuj malfaciligis la aŭskultadon. Ofte fona muziko dronigis la paroladon. La voĉoj sonis amare akre, pro la malbona sono de la mallongonda elsendo. La enhavo je la 21a de februaro pritemis aviadhistorion, poemon deklamitan en Kuba esperanta kongreso, informojn pri ekspozicioj diversloke en Kubo, esperantaĵoj en diversaj latinamerikaj landoj, kaj politikaj novaĵoj pri Kubo.

• **Nova retlegilo CHIMERA** nun disponeblas por uzantoj de Sistemo X de Macintosh-komputiloj. Ĝi bone montras la UNIKOD-ajn esperantaj literojn, kaj funkcias nekutime rapide. Oni povas elŝuti ĝin ĉe:

www.versiontracker.com

• **Ni provis por vi ELITRAD-on**, menciitan en nia marto-aprila numero, per aŭtomata tradukigo de repaĝo, ĉar oni reklamas ĝin tiucele. Jen la traduko provizita de ĝi por la paĝo de la Aŭstralia Olimpika Komitato pri la ormedalon gajninta Steven Bradbury:

Amaskomunikiloj rondiroj supre
Steve's raportaĵo

Lundo 18 Februaro 2002

<<http://www.olympics.com.au/webi/space.gif>>

Steven Bradbury estas viro en postulo.

La respondo al Bradbury's nenormala gajno en la men's 1000 metroj mallonga kurejo estas nenio mallonga de super kunrivereto de internaciaj kaj Aŭstraliaj amaskomunikiloj petegado pri lia

raportajo.

Kaj kio raportajo estas.

kvar-tempo Vintro Olimpikano kiu salut de suno-saturita Queensland kaj spit* la ŝancoj al gajno ora medalo ĉe liaj lastaj Ludoj.

Aldon kelkaj partoj nenormala fortuno, vivo raportajo tio, ke inkluziv apud morto sperto sur glitkur kaj du partoj Aussie ĉarm kaj la miloj daj ĵurnalistoj ĉi tie* sci ili estas sur gajninto.

Bradbury's est frontaj novaĵoj trans Usono kaj ĉiuj de la BBC al NBC havas dezir kelkaj vortoj de Australia's unua vintro gajninto de ora medalo.

Interne de ne tute 24 horoj de gajn oro, Bradbury aper sur Roy kaj HG's Glacio Revo, far vokoj al pli ol dekduo (da)o radiostacioj reveninta hejmen kaj havis nenombrelaj aliaj petoj por kelkaj minutoj lia tempo.

Kaj ĝi doesn't nur fin kun Steven.

Liaj gepatroj John kaj Rhonda, en Urbo Salt* Lake* kapti ilia son's historia atingo, havas eta dormo ekde la konkursero, elspezado multo de ilia tempo kampo alvokoj de bone wishers kaj la Aŭstraliaj amaskomunikiloj.

Ĉar ELITRAD diras ke ĝia celo estas ebligi legi anglalingvajn retpaĝojn en Esperanto, ni lasas al niaj legantoj decidi ĉu ĝia traduko kontentige konigas la signifon de la anglalingvaĵo.

- **Sherlock Holmes** nun havas sian retpaĝon en Esperanto ĉe: <http://www.utopia.com.br/esperanto/holmes>

Ĉe tiu paĝo vi trovos ankaŭ liston de liaj verkoj en Esperanto, kun aŭtomataj ligoj al unikod-esperantaj rettekstoj.

- **Uzantoj de Macintosh-Sistemo**

X povas akiri ĉ. 200 senpagajn unikod-esperantajn tiparojn ĉe la redaktoro de *ĜJK*. Tiuj novadaptitaj tiparoj ankaŭ kapablas montri la esperantajn literojn en ne-unikodkapablaj programoj Listo sendiĝos al vi laŭpete. Se specifa tiparo dezirata de vi ne estas en la listo, via redaktoro volonte adaptos ĝin al unikodo por vi senpage.

Via redaktoro ankaŭ akceptas senpage prepari por uzantoj de Windows unikodkapablajn tiparojn laŭ specifaj petoj.

Atentu ke multaj tiparoj kiuj estas jam dekomence en via Windows-98/2000/XP, aŭ Macintosh-Sistemo X jam estas unikodkapablaj kaj ne bezonas specialan adaptiĝon por unikodo:

Ĉiuj tiparoj aŭtomate instalitaj kun Windows 2000 estas unikodkapablaj.

Aŭtomate inkluditaj en Macintosh OS X estas la ĉisekvaj unikodtiparoj: Charcoal, Chicago, Courier, Geneva, Helvetica, Hiragino Kaku Gothic, Pro, Hiragino Maru Gothic Pro, Hiragino Mincho Pro, Monaco, New York, Palatino, Sand, Textile, Times, Zapfino.

(Atentu ke malgraŭ siaj strangaspektaj [al ni] nomoj, la tiparoj Hiragino Kaku, Hiragino Maru, kaj Hiragino Mincho donas la normalan Esperanto-alfabeton, kaj krome ankaŭ ebligas tapi japane kaj diverslingve).

- **La retejo <http://www.chinareport.com.cn> de *El Popola Ĉinio***, kiu ekzistas nun de unu jaro, pliriĉigis sian enhavon per novaj rubrikoj kiaj: "Legu kaj Ridu", "Tera Vilaĝo", "Ĉinaj markoj", "Ĉina lingvo", "Modo", kaj aldonis novajn specialajn temojn, kiaj "Listo de Mondaj Heredaĵoj de Ĉinio", "MKO [WTO] kaj Ĉinio".

El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-

100037 Beijing, Ĉinio. epc@china-report.com.cn; elpc@china.com.

[Laŭ *Retinfo*]

• **Afriko:** La Centra Oficejo de UEA kreis afrikan informilon *Tr'afrik*, kies 3a numero jam aperis. Tiu ĉi reta informilo dissendas tra la tuta mondo informojn pri la paŝoj kaj atingitaĵoj de la esperanta movado en Afriko.

Ĝia hejmpaĝo estas trovebla ĉe:

<http://www.multimania.com/afrikaoficejo>

[Laŭ *Ret-info*]

Monda Universitato: Invitite de Brazila Esperanto-Ligo, D-ro Adonis Marcelo Saliba Silva akceptis la taskon kunordigi laborgrupon por elabori projekton pri virtuala esperanta universitato. Laŭ la projekto, la Monda Universitato — jen la nomo de la virtuala lernejo kiun gastigos la nova pagxo de BEL — disponigos al Esperanto-parolantoj kiel eble plej multnombrajn kursojn pri la plej diversaj branĉoj de la homaj konoj.

BEL elektas nomojn el la plej elstaraj geesperantistoj de la tuta mondo por kontribui ne nur al la finpretigo de la propra projekto, sed ankaŭ por partopreni en la estonta etato de la institucio.

Monda Universitato respondos, per si mem, al unu el la plej gravaj demandoj pri Esperanto, nome, pri ties utileco. Ĉiuj esperantistoj estas invitataj viziti la provizoran paĝon de la Monda Universitato ĉe

<<http://www.astrale.com/mu>>.

Kiuj emas fari sugestojn pri la projekto, estas petataj kontakti D-ron Saliba per la adreso

<mondauniversitato@astrale.com>.

kopie al Departamento pri Komunikado en Brazila Esperanto-Ligo

<bel@esperanto.org.br>

[Laŭ *Ret-info*]

Kuriozaĵo el Rio de Aloísio Sartorato

La sidejon de Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio-de-Ĵaneiro vizitis ekslernanto, kiu restis for de la movado pli ol 10 jarojn. Kial li revenis? Ĉar li resopiris pri nia lingvo kaj movado. Sed kiu estis la kialo de tiu resopiro?

Nuntempe li laboras en la civila policejo de Rio-de-Ĵaneiro, ĉe informadika departemento, kiu havas kiel ĉefan celon esplori pri komputilaj piratoj. En la pasinta aŭgusto gravega brazila banko denunciis al la polico ke iu eniris la sistemon de la banko kaj forprenis R\$0,30 de ĉiu deponanto. Forpreno de R\$0,30 de ĉiu kliento tamen rezultigis la sumon de 15 milionoj!

Tiu “pirato” estis nur 14-jara junulo kaj pro tio li faris la transigon — al la konto de sia patro. La polico esploris la aferon kaj malkovris lin. Sed nun venas la kurioza flanko de la afero: la instrukcioj de la programo por eniri en la sistemon de la banko estis kodigitaj en — Esperanto! Malbonaĵo por la “pirato” estis ke la policisto kiu esploris la aferon konis nian lingvon! Tamen okazis nenio al la junulo, ĉar li estas nur 14-jara kaj pro tio laŭ la brazila leĝo nerespondeca. Sed antaŭ la liberigo li multe helpis la policistojn aktualigi kelkajn programojn de la komputiloj, laŭ li ne tre modernajn.

La okazintaĵo memorigis la policiston ke li iam lernis Esperanton kaj li resopiris pri la lingvo kaj la movado, kaj denove kontaktis nin el la klubo.

[El *ESPERANTO* marto 2002.] □



El la Regionoj



Okcidenta Aŭstralio:

Esperanto is in the latest LOTE Teaching Aids catalogue, along with English, Chinese (Mandarin), French, German, Modern Greek, Indonesian, Italian, Japanese, Spanish, and Vietnamese.

Items in the catalogue include: Stickers, bookmarks, flags, merit certificates, topic charts, maps, bingo, badges, stamps, pencils, verb charts, picture cards, flashcards, theme cards, art resources, posters, book labels, and resource books.

Trish O'Connor negotiated the inclusion of Esperanto with the local manufacturer, and says they have been most helpful and enthusiastic. They displayed a range of their products at the Summer School and the pilot Esperanto items, all nicely laminated, aroused considerable interest.

Summer School participants and ELOA members translated the many catalogue items into Esperanto, and Trish would like to thank those people for their valuable support.

The 2002 catalogue has been distributed to schools throughout WA and is available from LOTE Teaching Aids, PO Box 31, Victoria Park WA 6979, Australia. ☎ 9470 9186, 📧 9470 9187. <lotetead@iinet.net.au>.

Ĉe la Konversacia Rondo, Penny Vos prezentis al Courtney Barnes belan manfaritan atestilon kune kun librokupono je valoro de \$50, ĉar AEA juĝis ŝin la plej elstara ano de la komenca klaso en la Somerlernejo.

Al nia kara laborema ekskasisto,

ekssekretario Owen Loneragan, prezidanto Debra McCartney prezentis belan etan lignan memorigaĵon kun taŭga gravurita omaĝmesaĝo.

[El La nigra cigno]

Suda Aŭstralio: Vizito de Rainer Kurtz



De maldekstre dekstren vi vidas: Bob; Rainer; Audrey; Indrani; Katerina; Mike; Eileen; Sandor kaj Helena.

Rainer Kurtz estas esperantisto el Stuttgart, Germanujo. Antaŭ kelkaj jaroj li estis prezidanto de Germana Esperanto-Asocio. Li partoprenis la somerkursaron en Melburno antaŭ unu jaro, kaj subite li aperis en Adelajdo antaŭ kelkaj semajnoj. Li venis ĉi tien de Melburno. Unue li loĝis kelkajn tagojn ĉe samideano Sandor Horwatz, kaj poste kelkajn tagojn ĉe Audrey kaj mi. Post sia vizito al ni li flugis al Sidnejo.

[Informis Bob Felby]

Viktorio:

La Viktoria Federacio ekskursas:

Dufoje en la jaro la Viktoria Esperanto-Federacio ekskursas, celante renkonti la esperantistojn kiuj estas izolitaj en Viktorio. Ĉifoje Ballarat estis la elektita loko. Dek kvin melburnanoj enrajniĝis frue matene, sabaton

la 9-an de marto. La unu kaj duona horoj da veturado estis bona oportuno por interŝanĝi novaĵojn kaj informiĝi pri la begonia festivalo, la celo de nia ekskurso. En 1953 la urbo decidis krei festivalon honore al tiu floro, kiu estis malkovrita en la insuloj Antiloj en 1690, poste en 1864 en la pluvarbaro de la montaro Andes en Peruo kaj Bolivio, ĉar tiam estis modo kulturi ĝin malgraŭ la malfacilaĵoj; kaj la loka botanika ĝardeno povis fieri pri sia mondfama kolekto¹.



Fotis: Franciska Toubale

La tapiŝo el floroj en Ballarat

Je nia alveno akceptis nin Ann Doggett, kiu loĝas tie kaj preparis por ni la programon, kaj Stan Brutton, kiu venis de Castlemaine.

Kompreneble ni tuj vizitis la ekspozicion de la multnombraj specioj de begonioj. Imponas la kvanto da malsamaj brilaj koloroj kaj la grandeco de kelkaj specimenoj, kompare kun la modesta planto kiun mi antaŭe konis. Ĉiujare estas prezentata ankaŭ tapiŝo farita per miloj da floroj.

Estas okazo kiam la lokaj artistoj povas prezenti siajn lignajn, ŝtonajn, ferajn artaĵojn, kaj la ĥoroj povas distri la ĉeestantojn per siaj kantoj.

Ann invitis nin tagmanĝi en ŝia domo. Tiel eblis okazigi ankaŭ kunvenon pri federaciaj aferoj, i.a. pri la

venonta somerkursaro en Melburno.

Poste kelkaj el ni devis jam re-en-trajniĝi, dum la aliaj promenis laŭlonge de la lago kaj vizitis la artgalerion.

Ĉiu ĝuis la tagon, la agrablan veteron, la babiladon kun la konatoj, kiujn ne eblas ofte renkonti.

Verkis Franciska Toubale

Yarra Community Day, 17/2/2002
Paul Desailly kaj Frank Braham

POR RIDIGI VIN



En la preĝejo:

Ĉar hodiaŭ estas Paska Dimanĉo, ni petas s-inon Jones veni kaj demeti ovon sur la altaron!

Viro, telefonante al la adelajda flughaveno: "Kiom longe daŭras la flugo al Londono?"

Oficisto senpacience: "Mi petas, nur unu minuton!"

[El *Tamen Plu*]



[El *Monato* marto 2001]

1. Laŭ artikolo en la ĵurnalo *The Age*, eldonita de Triŝ.

AUDIT REPORT

To The Members

The Australian Esperanto Association Inc

Scope

We have audited the attached special purpose financial reports of the Australian Esperanto Association Inc for the year ended 30 June 2001, comprising a Profit and Loss Statement and Balance Sheet. The Committee is responsible for the preparation and presentation of the financial reports and the information contained therein, and have determined that the basis of accounting used is appropriate to the needs of the members. We have conducted an independent audit of the financial reports in order to express an opinion on it to the members. No opinion is expressed as to whether the basis of accounting used is appropriate to the needs of the members.

The special purpose financial reports have been prepared for distribution to the members of the Association for the purpose of fulfilling the Committee's accountability requirements. We disclaim any assumption of responsibility for any reliance on this report or on the financial report to which it relates, to any person other than the members or of any purpose other than that for which it was prepared.

Our audit has been conducted in accordance with Australian Auditing Standards. Our procedures included examination, on a test basis, of evidence supporting the amounts and other disclosures in the financial reports, and the evaluation of significant accounting estimates. These procedures have been undertaken to form an opinion as to whether in all material respects, the financial report is presented fairly

The audit opinion expressed in this report has been formed on the above basis.

Audit Opinion

In our opinion the financial reports of the Australian Esperanto Association Inc present fairly the assets and liabilities at 30 June 2001 and the income and expenditure of the Association for the year then ended

NORMAN A MOORE & CO



KIERAN JOHN MOORE
FCPA, B Com, Registered Company Auditor

493 Swan St
RICHMOND Vic 3121

DATE 21/2/02

Australian Esperanto Association Inc.

Balance Sheet
As of June 30, 2001Balance Sheet
As of June 30, 2001

	Jun 30, '01	Jun 30, '00		Jun 30, '01	Jun 30, '00
ASSETS			ASSETS		
Current Assets			Current Assets		
Current/Savings			Current/Savings		
1. OPERATING ACCOUNT	12,669.92	16,627.80	1. OPERATING ACCOUNT	6,669.92	5,694.26
2. CAPITAL ACCOUNT (Fonduso)	144,817.92	146,702.96	CBA Cheque Account 0090 3636	6,000.00	10,933.54
3. BOOK SERVICE (Libroservo)	38,450.54	37,149.96	CBS Term 5004 3872 (2/11/02/001)		
4. CORRESPONDENCE COURSE	8,812.00	8,234.83	Total 1. OPERATING ACCOUNT	12,669.92	16,627.80
5. SUMMERSCHOOLS	16,361.52	8,979.96	2. CAPITAL ACCOUNT (Fonduso)		
6. INTERNATIONAL TRAVEL FUND	29,021.49	27,430.36	Cheque Account 00948975	7,836.50	9,478.20
7. ILEI (Held by AEA)	-280.71	-301.20	AMP Blue Chip	14,687.75	13,453.07
Total Current/Savings	249,852.68	244,824.67	AMP High Growth	0.00	13,048.01
Other Current Assets			AMP Multimaneger	7,243.62	6,548.31
INVENTORY	17,652.32	17,615.00	AMP Property Security	6,702.36	6,110.63
Total Other Current Assets	17,652.32	17,615.00	Term 5020 6634 (Cl. 25/1/2002)	5,133.94	4,850.99
Total Current Assets	267,505.00	262,439.67	Term 5022 4058 (Exp. 9/12/2002)	20,213.75	20,213.75
Fixed Assets			Term 5028 3226 (Exp. 13/2/2002)	5,000.00	5,000.00
PROPERTY & EQUIPMENT	1,600.00	1,600.00	Term 5030 5026 (Exp. 9/9/2002)	10,000.00	0.00
Total Fixed Assets	1,600.00	1,600.00	Term 61512671-1 (Exp. 31/6/2005)	18,000.00	18,000.00
TOTAL ASSETS	269,105.00	264,039.67	Term 9400 7968 (Exp. 15/4/2004)	26,000.00	26,000.00
LIABILITIES & EQUITY			Term 9502 2742 (15/7/2005)	14,000.00	14,000.00
Equity			Term 9801 0388 (Exp. 15/4/2008)	10,000.00	10,000.00
Opening Bal Equity	256,632.34	256,632.34	Total 2. CAPITAL ACCOUNT (Fonduso)	144,817.92	146,702.96
Retained Earnings	7,407.33	906.13	3. BOOK SERVICE (Libroservo)		
Net Income	5,065.33	6,501.20	NAB Cheque Account 60-832-2985	30,710.72	20,890.96
Total Equity	269,105.00	264,039.67	UEA Account (Netherlands)	7,739.82	16,259.00
TOTAL LIABILITIES & EQUITY	269,105.00	264,039.67	Total 3. BOOK SERVICE (Libroservo)	38,450.54	37,149.96
			4. CORRESPONDENCE COURSE		
			CBA Savings Acc. 500 4332	719.72	1,034.81
			CBA Term 5003 6074 (Exp. 7/8/01)	5,500.00	5,000.00
			Cheque Account	2,592.28	2,200.02
			Total 4. CORRESPONDENCE COURSE	8,812.00	8,234.83
			5. SUMMERSCHOOLS		
			SUMMER SCHOOL - ADELAIDE	4,953.43	4,774.89
			SUMMER SCHOOL - PERTH	8,529.61	0.00
			SUMMER SCHOOL - SYDNEY	2,697.30	2,727.00
			SUMMERSCHOOL - MELBOURNE	181.18	1,478.07
			Total 5. SUMMERSCHOOLS	16,361.52	8,979.96
			6. INTERNATIONAL TRAVEL FUND		
			Term 5013 8423 (Exp. 12/5/02)	14,144.70	13,461.97
			Term 5014 3134 (Exp. 10/9/01)	14,876.79	13,969.39
			Total 6. INTERNATIONAL TRAVEL FUND	29,021.49	27,430.36
			7. ILEI (Held by AEA)	-280.71	-301.20
			Total Current/Savings	249,852.68	244,824.67
			Other Current Assets		
			INVENTORY		
			Stock - 3. Book Service	15,220.75	14,932.00
			Stock - 4. Correspondence Course	2,431.57	2,683.00
			Total INVENTORY	17,652.32	17,615.00
			Total Other Current Assets	17,652.32	17,615.00
			Total Current Assets	267,505.00	262,439.67
			Fixed Assets		
			PROPERTY & EQUIPMENT	1,600.00	1,600.00
			Total Fixed Assets	1,600.00	1,600.00
			TOTAL ASSETS	269,105.00	264,039.67
			LIABILITIES & EQUITY		
			Equity		
			Opening Bal Equity	256,632.34	256,632.34
			Retained Earnings	7,407.33	906.13

Australian Esperanto Association Inc.

Balance Sheet
As of June 30, 2001

	Jun 30, '01	Jun 30, '00
Net Income	5,065.33	6,501.20
Total Equity	269,105.00	264,039.67
TOTAL LIABILITIES & EQUITY	269,105.00	264,039.67

Australian Esperanto Association Inc.**P&L Previous Year Comparison**

July 2000 through June 2001

04/04/02

	Jul '00 - Jun '01	Jul '99 - Jun '00
Income		
AMP Trust Distribution	2,861.65	2,414.00
Book Sales	5,608.35	0.00
Donations	0.00	631.00
Interest Received	11,827.69	9,311.00
Members Subscriptions	1,915.69	4,268.00
Other Subscriptions	11,822.71	14,379.00
Summer School		
- Funding / Sponsorship	7,500.00	0.00
- School Fees	26,583.98	26,831.00
Total Summer School	34,083.98	26,831.00
Sundry Income	324.00	379.20
Total Income	68,444.07	58,213.20
Expense		
Advertising & Promotion	0.00	761.00
Auditor's Remuneration	3,267.00	2,520.00
Bank Charges	200.13	221.00
Computer Expenses	1,248.00	4,892.00
Cost Of Books / Magazines	4,889.43	0.00
Donation to PIV	0.00	6,050.00
ESK Magazine Expenses	2,167.27	2,094.00
Exams	155.35	0.00
Freight & Cartage	0.00	121.00
General Expenses	753.13	648.00
Insurances	140.81	270.00
Oceania Project	474.47	1,550.00
Postage	405.57	417.00
Printing & Stationery	275.00	1,287.00
Subscriptions & Donations	8,559.18	8,666.00
Summer School Costs		
General, Hire, Printing	33,789.35	18,458.00
Teachers, Travel & Expenses	5,550.00	3,757.00
Total Summer School Costs	39,339.35	22,215.00
Uncategorised Expenses	1,506.05	0.00
Total Expense	63,378.74	51,712.00
Net Income	5,065.33	6,501.20

**LA AŬSTRALIA KAJ LA
NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

Prezidanto: *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH); 📠 03 9905 3668 (BH).

esperanto@education.monash.edu.au

Vicprezidantoj:

Franciska Toubale, 1 Marne Rd, Mt Evelyn Vic 3796.

franciska@bigpond.com

Hazel Green, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401.

hazgreen@tmba.design.net.au

Sekretario: *John Gallagher*, 81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268.

abcetc@ozemail.com

Vicsekretario: *Bob Felby*, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

esperantobob@iprimus.com.au

Kasisto: *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

Pitney@Cybernetint.net

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

Prezidanto: *Bradley McDonald*, PO Box 12 103, Auckland 1135.

☎ 09 579 4767, 📠 09 579 1070.

neelam@voyager.co.nz

Sekretario: *Howard Gravatt* PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035.

☎ 09 626 6129.

hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: *Jackie Fox*, Unit 89 Crestwood Village, 38 Golf Road, Titirangi Auckland 1007. ☎ 09-826 2081.

brianandjackie@abztrak.co.nz

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

<http://www.esperanto.org.au/>

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

NZ\$40 por individuo, \$50 por gedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: *Jackie Fox*, Unit 89 Crestwood Village, 38 Golf Road, Titirangi Auckland 1007.

Unuopaj ekzempleroj de Esperanto sub la Suda Kruco: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Menu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: €23,70; pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2002 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©2002 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de EJK estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac DV SE, la programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per Power Mac 7300, kaj Acrobat.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K., K.R.A.J.O.N., K.R.E.T

Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisionistoj

Vera Doloro, L.M.K.

[lia multsufieranta kontrolanto]

Por foto de Odlo Bokserp, ĉi tiu numero devas esti en la multkolora.